



Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://kajeroj.50megs.com/k49.htm>

<http://www.educar.org/Revistas/Esperanto49.htm>

POST NI, LA ĜANGALO...



ANTAŬ NI, LA DEZERTO!

N° 49

Januaro/marto 2001

Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Juan Antonio Cabezas Martínez,**
c/ Jabonerías, 6-3^oD,
ES30 001 Murcia (Hispanio)

Sekretario: **José Pina Tuells,**
c/ St^a Teresa, 22-2^o CD,
ES30005 MURCIA

Libroservo: **María del Mar Guirao Gallego,**
Avd^a Juan Carlos I, 22-8H
ES30080 Lorca

Redaktoro: **Jesuo de las Heras,**
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

Vicprezidanto: ankoraŭ neniu oficas

Kasisto: **José María Bernabéu Franco**
Gral. Primo de Rivera, 8
E-03360 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la nova konto n^o 0182 1854 47 0202 6555 116 en libreta de Caja Postal. Sen aldona kosto. La abono kostas 1000 pesetojn aŭ 6 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

Kovrilo: Bildo farita de Snajpero ironias pri homoj, kiuj opinias, ke ili estas neanstataŭeblaj.

Pretigas la Kajeron:

Provokrekto: **José Pina Tuells,**

Redakto: **Jesús de las Heras Jiménez.**

Enhavo

Redaktore:	3
Informoj de la Prezidanto	4
Kelkaj necesaj klarigoj	5
Premio Zamenhof 2001	6
Al la prezidanto de HALE (kial mi eksiĝos).	7
Responde al Jakvo	10
La faraono, de Boleslaŭ Prus	12
Okaze de la 25 jaroj sen Franko	15
Kunveno de HALE	18
Pri la 60-a Hispana Esperanto-Kongreso en San Javier (Murcia)	19
Datreveno «negrava»	20
Kion signifas Esperanto por laboristoj	21
Kurso en Sabadeljo	22
Kurso pri muziko	23
Statuto de SAT	24

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni povas reprodukti artikolojn, kondiĉe ke oni citu la originon.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mis-traktas iun ajn personon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

Redaktore:

Kelkaj gravaj aferoj okazis en nia asocio de la lasta, eksterordinara, numero de novembro.



Artikolisto respondita de mi en tiu numero, tute ne ŝatis tiun plumnomon, kiun mi elektis por kaŝi lian identecon -kiel petite-, kaj li plendas, ke *La verkinto de la titolita letero* al naciisto publikigita en la lasta numero de **Kajeroj el la Sudo** volas rimarkigi ke: *ne subskribis la leteron kiel katalunisto sed kiel kataluno kaj ne konsideras la leteron naciisma; oni ne parolis pri nacioj sed nur pri lingvaj rajtoj. Tio ne signifas ke li estu nek malfavora nek favora al naciismo.* Legantoj juĝu. Eĉ se li en interreto malkaŝis sian nomon, mi daŭre honoras lian iaman peton, kaj mi ne diras lian veran nomon ĉi tie. Kutime mi insistas, ke artikolantoj subskribu per reala nomo kaj sendu foton, ĉar tio plialtigas la nivelon de la magazino kaj de la artikolo mem. Tamen, mi komprenas, ke ekzistas delikatajn kialojn por uzi plumnomojn (alidirite *kaŝnomojn*), kiel ekzemple modestecon, timemon, aŭ timon pri revenĝo, kaj pro tio, nome de libereco, mi akceptas ankaŭ kromnomojn.

Oni demandis al mi publike en Ĉefio iam, ĉu mi estas *liberecana*, kaj mi vidas nun, ke mia respondo tute dubesencis: *Ĉu sufiĉas por esti liberecana, ke mi amas liberecon senkondiĉe?* Ĝi estis sincera demandrespondo. Kunĉeestanto diris, ke *ankaŭ faŝistoj diras, ke ili amas liberecon, tamen ili ne estas liberecanaj.* Tion oni dismetis foren tiam, sed fakte mi nun komprenas, ke ĝi entenas

veron: ne, ne nura amo al libereco igas onin liberecana. Fakte tio estus difino pri *libera*. Renonci al persona libereco pro atingo da liberecon por sia grupo: jen liberecanismo. Amo al libereco super ĉio igas onin *liberulo*, tamen, kaj tio ja povas esti ekzakte la malo al liberecano. Kiam oni parolas pri liberismo, oni referas al *kapitalisma* sistemo pri *libera entrepreno*, kion liberecanoj jam denuncis kiel *liberecon por ekspluatado*, kion mi ankaŭ kontraŭstaras. Sed ankaŭ ekzistas *intelekta, politika kaj socia liberismoj*, ne menciante *tiun religian*. Libereco estas celo de multaj antaŭuloj niaj, kiuj mortis por atingi ĝin. Eble ili ne konis ĝin, eble ili ne sukcesis krei altkvalitan liberecon, sed tamen ili provis. Ni pensu pri tiuj mortintoj de Franca Revolucio, ni pensu pri tiom da fuĝintoj de eŭropaj kaj neeŭropaj reĝimoj de la estinto kaj la estanto. Venas al mia kapo nomoj de homoj, kiel Meri Ŭolstonkraft (Mary Wolstonecraft), Tomas Pejn (Thomas Paine), Oskar Ŭajld (Wilde), Miĥaelo Servet' aŭ Nikolao Koperniko, kiuj tiom multe suferis pro liberopinioj siaj. Ili suferis, ĉar ili estis, respektive, virino, herezulo, samseksemulo, kaj sciencistoj. Danke ankaŭ al ili ni nun povas diri tion, kion ni libere opinias, malgraŭ tiuj, kiuj asertas, ke nur tiuj, kiuj plenumas certajn kondiĉojn, povas libere esprimi sin. Libereco bezonis naskintojn, kaj ilin ĝi trovis. Sed nun ĝi ankoraŭ bezonas flegistojn, kaj ne ĉiam ĝi havas ilin en la etosoj, kie oni esperus trovi ilin. Se ni ne protektas liberecon, ni perdos ĝin. Tiusence faras prave ĉeĥaj ĵurnalistoj ĉi tiuj tagoj. Tiusence devus fari ni ĉiuj ĉiutage.

Sekve, mi volas, ke **Kajeroj el la Sudo** estu anguleto, en kiu ĉiuj povas rezoni sian veron. Tio estas la kerno de mia kontrakto kun HALE. Se tiu kondiĉo estas postuli troe al nia asocio, oni nepre anstataŭu min kiel redaktoron de ĉi tiu magazino.

Jesuo

Informoj de la prezidanto



Dum la pasinta okazo de la Festo de Zamenhof, kiu okazis en restoracio de Alikanto, tiel kiel ni promesis antaŭ unu jaro, la redaktoro de

Kajeroj el la Sudo disdonis inter la partoprenantoj la plejbonan artikolon publikigitan en nia magazino dum la jaro 2000. Ĉi foje estis la artikolo *Malfeliĉaj Malkristnaskoj*, de pseŭdonoma **Scrooge**, kiun ni publikigis en nia numero 45-a. Ni volas plibonigi la aferon, estos la legantoj de nia magazino tiuj, kiuj elektos la artikolon, kiu plej indas premiĝi zamenhofe. En la paĝo 6-a aperas la manieron baloti por nia plej bona artikolo.

Ni volas plibonigi la kvaliton de nia magazino, kaj tiucele ni aĉetos novan digitalan maŝinon. Ni esperas, ke baldaŭ niaj enspezoj permesos tion al ni.

Oni diras, ke *post ŝtormo, venas belvetero*, kaj vere post la *snajpera ŝtormo* ni atendas multe pli belan veteron: HALE jam havas novajn membrojn. Bonvenigon al ĉiuj. Kiam ni publikigis la polemikotajn artikolojn ni atendis reagon, sed ne tian, kaj evidente ne tiom akran. Kiam ni publikigis la artikolon, ni volis atingi tri celojn:

1° Protesti kontraŭ la entreprenoj de eventuala laboro.

2° Helpi laboristojn per argumentoj

kontraŭ ekspluatado fare de provizordungaj entreprenoj.

3° Repensi pri la Historio de Hispanio kaj la malbona agado de faŝismo.

4° Prezenti praktikan manieron pritrakti liberon pri opinio.

Eĉ se iu haleano ne ŝatas tion, ke ni publikigas artikolon verkitan de aŭtoro faŝista, ni povas esperi, ke ŝli estu sufiĉe inteligenta por scii, ke ne pro tio ni estas faŝismaj aŭ apogas tiun doktrinon. Se ni uzas argumentojn de dekstruloj, oni povas pensi, ke ni aprobas ekspluatadon de homo fare de homo. Tamen ni bezonas kompreni argumentojn de dekstruloj por kontraŭargumenti ilin. Se ni ekskludas tiujn, kiuj ne opinias same kiel ni, ni uzas



dekstrulajn procedojn, kaj ni iĝas dekstruloj. Dum la plej nigraj tempoj por ekspluatatoj kaj maldekstruloj, oni bombadis kaj perfortis, ĉar oni ne povis instruiĝi.

Hodiaŭ ne ekzistas tiu senkulpigo. Nun ni povas konfronti argumentojn, kaj klopodi kompreni la verajn problemojn sociajn kaj kunvivajn niajn, kaj ekskludi kaj diskriminacii tute ne eblas, taŭgas aŭ inteligentas.

Mi bedaŭras, ke kelkaj haleanoj ofendiĝas pro la sinteno de aŭtoro, sed ili ne donas solidan argumenton, sed dubesencan ofendemon.

Ni esperu, ke tio estu kvazaŭ somera pluveto, post kiu venos abunda, fruktodona rikolta tempo.

Kelkaj necesaj klarigoj al la artikolo **Limoj al la esprimlibero**, verkita de la sekretario de HALE José Pina Tuells en la n-ro 48-a de novembro 2000 de **Kajeroj el la Sudo**

Lastatempe ni povis legi en nia bulteno **Kajeroj el la Sudo** artikolojn, kiuj rilatas al la faŝista Falango. En la n-ro 46-a falangisto Fernando Letamendía signas artikolon pri la *Provizordungaj perentreprenoj* en kiu li laŭdas la doktrinon falangisman.



En la n-ro 48-a nia sekretario, post renkonto kun membroj de politika partio Falango Hispana, skribas pri la proponaro de Falango al rekta demokratio, maksimuma povo por la municipoj, *respekto de la ekzisto kaj funkciado de la politikaj partioj*, laborista regado de la privataj entreprenoj, starigo de sindikato naciskala kaj politike plurtendenca kies roloj estus la kontrolo de la produktado, ellaborado de laborleĝoj kaj socialaj regularoj, ŝtata kontrolo de la kredit-sistemo kaj sociigo de la urbaj terenoj surkonstrueblaj, cele al evito de la spekulacio, planoj por efika kaj hominda reintegrigo de la sendomuloj laŭ almozuloj en la socion, redistribuo de la kamparaj bienegoj, ŝtato bazita sur la konsento libervola kaj neperforta de siaj komunumoj, ktp. Vera paradizo!!, mi aldonas. Sekvante la legadon ni trovas, ke *ŝajne Falango Hispana ne plu estas, eble neniam estis, kontraŭdemokratia gru-*

po, kaj fine, ke *antaŭ la homaj rajtoj ni ĉiuj estas egalaj, kaj ne iuj pli egalaj ol aliaj*. Mi opinios nur pri tiuj-ĉi temoj, kiujn mi konsideras la plej gravaj.

La respekto al ekzisto kaj funkciado de la politikaj partioj konsistis, dum la regado de la faŝista perfida generalo Franko, tute simple el la malpermeso de iu ajn partio, kiu ne estis akorde kun la faŝista ideologio. La Hispana Falango kunlaboris de la unuaj tagoj de la hispana revolucio kun la faŝista reĝimo kaj pluraj falangistoj estis ministroj de Franko.

Starigo de sindikato naciskala kaj politike plurtendenca, ktp: rimarku, ke estas dirite *sindikato naciskala*. Efektive, dum la faŝista regado estis nur unu sindikato nomata *sindikato Vertikala* kaj ĉiuj aliaj laboristaj sindikatoj estis malpermesataj. Estas ankoraŭ pluraj mensogoj en la falangaj proponoj prezentataj de J. Pina Tuells, sed oni povas juĝi laŭ la politika kaj socia etoso de tiu nigra periodo de la hispana historio kiaj estis la konsekvencoj de la faŝista diktaturo inter la laboristaro.

La efika kaj hominda reintegrigo de la sendomuloj kaj almozuloj en la socion ĝis nun estas farita de faŝistaj grupoj, kiuj atakas, vundas kaj foje mortigas sendomulojn kaj almozulojn. Ne nur en Hispanio, sed ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj, en kiuj la malsamuloj, almozuloj, sendomuloj, samseksemu-

loj, eksterlandaj laboristoj, kiuj ne konformas al la nacia stereotipo, estas persekutataj kaj kruele atakataj.

Ke ŝajne, Falango Hispana ne plu estas, eble neniam estis, kontraŭdemokratia grupo. Certe nur ŝajne. Tuj kiam la perfida Generalo Franko invadis Hispanion, venante de la nordafrikaj hispanaj kolonioj, li trovis helpon de la faŝista hispana Falango, kiu de jaroj prepariĝis por konkeri la ŝtatan povon. En la hispana parto okupita de la franka armeo la falangistaj patroloj persekutis tage kaj nokte la homojn, precipe laboristojn, kies delikto estis batali por sin liberi de konstanta mizero kaj celi al pli justa kaj libera socio. Falango torturis kaj mortigis milojn kaj milojn da simplaj popolanoj sen doni al ili ian eblecon sindefendi. Arestitaj dum la tago kaj mortpafitaj dum la ektagiĝo de la sekvanta tago.

Antaŭ la homaj rajtoj ni ĉiuj estas egalaj, kaj ne iuj pli egalaj ol aliaj. Mi miras pri la naiveco de tiu aserto. Ni ĉiuj **devus** esti egalaj, sed tio ne okazas kaj bedaŭrinde ni devos atendi longtempe por ke tio okazu. Esencaj rajtoj mankas en precipe malriĉaj landoj, sed ne nur en ili. Egaleco inter virinoj kaj viroj, rajto al edukado, al digna vivo sen malsato kaj sen malsanoj, al libero, kaj tiel plu. Ni travivis historian periodon en kiu la diktaturoj el ia ajn tendenco mizerigis kaj suferigis la popolojn kiuj, bedaŭrinde, estis malpli

egalaj ol aliaj. Nuntempe, kiam la eksplodo de modernaj komunikiloj faras de nia planedo virtualan vilaĝon, la monda kapitalistaj organizoj daŭre ekspluatadas la laboristojn en la tria mondo mizerigante ilin kaj provas fari same ĉie, kie la cirkonstancoj estas favoraj al iliaj planoj. Ne, ni ne estas egalaj.

Se nia sekretario José Pina Tuells vere kredas tion, kion li verkis, lia loko ne estas en laborista progresema asocio, sed en alia organizo pli akorde al liaj ideoj.

Kamaradece,

Marteno

*Kopiu ĉiun traĵeton kaj sendu al Redakto de **Kajeroj al la Ondo**, Ap. 4461, E.O.B.30080, Murcia, Hispanio, antaŭ la 30-an de novembro de 2001.*

Premio Zamenhof 2001

Jes, mi voĉdonas por la artikolo _____, verkita de _____, kiel plej bona artikolo dum la jaro 2001. Mi konsideras, ke ĝi estas aparte inda, ĉar

Subskribas _____ en _____ la ____-an de _____ de 2001.

Al la prezidanto de HALE, al la redaktoro de Kajeroj el la Sudo. Kial mi eksigôs de HALE.

Legante la artikolon de Jesuo *Pri pasia reago al alies opinio* aperinta en la n-ro 48-a de Novembro de 2000 de **Kajeroj el la Sudo**, mi decidis ĝin kritike komentarii, ĉar, laŭ mi, kelkaj punktoj estas kritikendaj.

En nia revuo ne estas, kaj neniam estos, cenzuro. Ĉiuj vidpunktoj estas defendeblaj, kondiĉe ke oni honoras kelkajn principojn, difinitajn en la pagô 2-a de nia magazino, nome, ke la enhavo estu interesa kaj ne mistraktu iun ajn personon.

Mi rilatas al la artikolo *Limoj al esprimlibero*, aperinta en la sama n-ro 48-a de **Kajeroj el la Sudo**, verkita de la sekretario de la hispana LEA-o HALE José Pina Tuells. Mi ne komprenas en kio tiu artikolo estas interesa se ne estas la laŭda propagando de la faŝistaj falangismaj ideoj. En Hispanio ni scias kio estis la Hispana Falango kaj neniu el la proponoj kaj diroj, kiujn sciigas la verkinto pri la Hispana Falango, estas veraj. Mi konsideras insulta tiun artikolon al la progresemaj legantoj de la bulteno, kiuj ankoraŭ bone rememoras tiun nigran periodon de la hispana historio, kiun ili ĝin travivis, en kiu la Falango Hispana dole mortigis simplajn popolanojn.

Faŝismo ne estas limigita al iuj ajn apartaj sigloj aŭ politikaj partioj. Laŭ la tria difino de la Vortaro de la Hispana Akademio, ĝi estas excesiva-

mente autoritario (troe aŭtoritatisma).

Tiusence ni ne estas, kaj neniam estos, faŝismaj.

Laŭ la aliaj du sencoj (ana aŭ rilata al faŝismo kaj partiana al ties doktrino aŭ movo socia), ankaŭ ni ne estas faŝismaj.



Ĉiu scias, ke faŝismo en sia praktiko estas ligita al fifamaj sigloj aŭ faŝistaj politikaj partioj. Faŝistaj reĝimoj kies ĉefoj estis Hitlero, Franko, Mussolino, Stalino, kaj tiel plu, ne nur estis troe aŭtoritasmaj, sed gravaj krimuloj, kiuj mortigis milojn kaj milojn da homoj. Se faŝismo ne estas limigita al iuj apartaj sigloj aŭ politikaj partioj, kelkaj apartaj faŝistaj sigloj ka politikaj partioj estis krimaj, sangavidaj kaj ekstermis politikajn, etnajn, religiajn, kaj aliaj opoziciulojn. Koncentrejojn en Siberio kaj gazĉambrojn en Germanio atestas pri io pli grava ol *troa aŭtoritatismo*.

Laŭ historio, falangismo ne helpis Franciskon Frankon puĉi en Hispanio, sed li uzis ĝin same kiel li uzis la Katolikan Eklezion, la hispanan armeon, la neŭtralecon de la demokratioj de la tiama mondo kaj ĉiujn ajn aliajn rimedojn por siaj celoj. Tiusence la Falango Hispana estas tiom fia kiel la menciitaj instancoj, sed

ne pli. Postuli, ek nek pastro, nek armeano, nek demokrato angla, franca aŭ usona povas publikigi sian opinion en niaj paĝoj ŝajnas al ni troa kaj ne rilata al racio.

Ne rilatas al racio miksi ĉion por kaŝi la veron. La Hispana Falango estis preparita de jaroj por batali kontraŭ la Hispana Respubliko. De la alveno de Franko de la nordafrika hispana kolonio, la Hispana Falango helpis la perfidan generalon en la batalo kontraŭ la progresema hispana popolo. Ankaŭ la Katolika Eklezio tuj apogis la faŝistojn, propagandis intense kontraŭ tiuj, kiujn ili nomis *ruĝuloj, demonoj* kaj tiel plu, benis la armilojn de la faŝista armeo kaj salutis levante la dekstran brakon laŭ la faŝista maniero. Ili ne povis rekrei la *Sanktan Inkvizicion*, sed faris ĉion eblan por helpi la perfidulojn. Ne ĉiuj estis same fiaj. La Katolika Eklezio kaj la Hispana Falango estis pli fiaj ol la aliaj. Precipe tiu-ĉi lasta havas grandan respondecon kiel mortigintoj de grava parto de la laborista hispana popolo.

En la n-ro 47-a, oktobro/decembro 2000 de *Kajeroj el la Sudo*, estas recenzita libro kies titolo estas **Los nuestros** (la niaj). Mankas la nomo de la recenzanto. Mi protestas kontraŭ tiu verkisto, kiu sin arogis la rajton trudi al mi kiel miaj kelkajn hispanojn, kiujn mi tute malŝatas, malamas. Precipe perfida faŝista Generalo Franko ne estas mia, kaj certe de neniu demokrata hispano. La propagando pri tiu libro estas tute ne

oportuna en organo de progresema laborista asocio kiel HALE.

Ankaŭ mi kondolencas al kamaradoj kiuj, pro nescio de la historio ĵusa, estas senhelpe mensogataj de artikoloj...

Kamaradece,

Marteno

NOTO DE LA REDAKTORO.- Ambaŭ artikoloj de kamarado Marteno Bustín Benito ja indas respondon. Tamen, la kutimo en **Kajeroj el la Sudo**, pro respekto al ĉies kaj ĉia opinio, estas ne reagi en la sama numero. Do, venontfoje ni sciigos reagon al ambaŭ artikoloj. Sekve, legantoj eltiru siajn proprajn konkludojn el ambaŭ artikoloj de kamarado Marteno, el nia ne tuja reago, kaj ankaŭ el apuda artikolo de Jakvo kaj nia respondo en paĝo 10-a, kiun la reagato konas kaj aprobas, ke oni publikigu nun.

Nur notigas mi, denove, ke ĉiun nesubskribitan artikolon verkis la redaktoro.

Jesuo.



Bonvolu membroj de SAT scii, ke de la 1-a de januaro, la banko-konto de la peranto en Hispanio de SAT, k^{do} Marteno Bustín Benito, estas 0182-3001-91-0203052956.

Reago pri la Snajpera afero

Kara amiko, Permesu ke mi reagos al teksto kiu aperis en **Kajeroj el la Sudo 48**.

Kiel laboristo kaj SAT-membro, redaktanto de **Liberecana Ligilo**, kaj leganto de **Laŭte** mi petas al vi legi miajn rimarkojn al la lasta numero de **Kajeroj el la Sudo**. Rilatas al la letero de nia amiko Snajpero. Ne vere plaĉas al mi la diro de la prezidanto de HALE, kdo Martinez, kiu pro malĝusta elekto de vortoj, ŝajnigas ke Snajpero estus naziisto (paĝo 4). Mi certe ne akceptis ĉi tiun frazon de k-do laboristo. Mi povas konsenti ke Snajpero prefere unue sendus leteron al Hale anstataŭ al **Laŭte**, sed ja mi konas lin kaj liajn emociojn kaj mi plene komprenas lin.

Pri la rajtoj de redaktoroj. Interesa estas la reago de la redaktanto Jesuo. Ĝis kia grado ni redaktantoj estas liberaj? En **Liberecana Ligilo** mi postulis plenan liberecon, ĉiuj scias tion, sed aliflanke mi scias al kiu publiko mi laboras. Mi malfermis la paĝojn de **Liberecana Ligilo** al ĉiu radikal-socialismaj ideoj kaj pensoj. Evidentas ke homoj kiuj volas propagandi aŭ disvastigi reakciajn ideojn por ne paroli pri ekstremdekstrajn ideojn, ne trovas forumo en **Liberecana Ligilo**. La diverseco inter **Kajeroj el la Sudo** kaj **Liberecana Ligilo** evidentas, ĉar **Kajeroj** estas la informilo de Hale, laborista asocio kun membroj kun diversaj ideologioj irante inter liberecanoj tra komunistoj ĝis social-demokrataj.

Hale estas daŭre pro la Gotenburga konvencio ligita al SAT. Laŭ mia kompreno la ideo de SAT reflektiĝos ankaŭ en la LEA-oj. Do la ligiteco kun SAT iom montras la vojon laŭ kiu HALE konstruiĝis. Mi komprenas ke HALE

defendas certan ideologion, sed tiu ne malpermesas ke la redaktanto de la gazeto rajtas, por kompari ideojn, aperigi ideon tute aliflanke ol la propra ideologio. La problemo kompreneble estas ke vi povas ricevi akran kritikon de konvinkitaj membroj, bonaj kamaradoj. Mi, pro tio, ne komprenas la reagojn de la prezidanto de HALE al Snajpero.

La frazo : *Ĉiuj ideologioj estas bonaj, sed homaj estoj perfidas ilin* estas por mi eklezia salivo. Evidentas ke la ideo de faŝismo neniam rajtas ricevi subtenon. Neniu formo de ekstremismo estas subtenenda, krom ekstrema propagando por humanismo.

Fine, ĝis nun mi kiel redaktanto de **Liberecana Ligilo** neniam ricevis tekston, kiun mi ne povis aperigi, sed mi scias kiam iam venos la momento, ke mi certe ne forĵetas la tekston, sed unue petas klarigojn al la verkisto kaj se eblas aperigi la tekston kiel mi ricevis ĝin, sen fortranĉoj, sen ŝanĝoj. Iu ajn formo de cenzurado estas al mi fremda eĉ kiam mi ricevus leteron kiel la snajperan, sed mi certe prenis kontakton kun li kaj eble ni solvus la problemon sen bruo al la ekstera mondo.

Ĉu la franca, sveda aŭ belga realo estas malsamaj al la hispana, mi pridubas. Kontentigi ĉiun neniam eblas, trovi la plej larĝan kompromison estas terure laĉiga kaj malfacila. Mi laboras kun la koro kaj mi timas ke ankaŭ mia amiko Jesuo faras tion. Mi neniam volas direkti al plena racieco kiam mi pritraktas la tekstojn por **Liberecana Ligilo**, ĉar kiam mi faras tion, ankaŭ mortas la animo de la revuo, plej verŝajne Jesuo pensas la sama pri sia revuo kiun ni iomete pritraktas nian infanon.

Plej amike,

jakuo

Responde al Jakvo

Mi respondas al kelkaj aferoj de la letero de nia kamarado, citante ilin kursive.

Saluton, Jakvo!

Dankon pro via mesaĝo. Tiu via ne estas la sola reago, tamen ĝi ja estas la plej civiliza. ☺

Snajpero. *Ne vere plaĉas al mi la diro de la prezidanto de HALE, kdo Martinez, kiu pro malĝusta elekto de vortoj, ŝajngigas ke Snajpero estus naziisto (paĝo 4).*

Nu, ĉu la agoj de Snajpero similas al tiuj de naziistoj, aŭ ĉu sama ago estas fia nur se ne farita de amiko nia? Tiu *malpuriga* afero de Snajpero ja estas eklezia vortumado, kvazaŭ Sankta Paŭlo verkis ĝin...

[...] *tiun frazon de k-do laboristo. Mi povas konsenti ke Snajpero prefere unue sendus leteron al Hale anstataŭ al Laŭte, sed ja mi konas lin kaj liajn emociojn kaj mi plene komprenas lin.*

Ĉu oni devas permesi al Snajpero tion, kion oni ne devas fari? Ĉu li estas infaneto aŭ handicapita? Ĉu li jam sufiĉe kreskis, por postuli, ke li respondecu pri siaj propraj agoj?

Pri la rajtoj de redaktoroj. *Interesa estas la reago de la redaktanto Jesuo. Ĝis kia grado ni redaktantoj estas liberaj? En Liberecana Ligilo mi postulis plenan liberecon, ĉiuj scias tion, sed [...]*

Laŭ mi, ĉiugrada libereco. Respondeca redaktoro difinas siajn proprajn limigojn. Mi jam difinis ilin formale en la paĝo dua. Funde, mi ne havas limon por redakti la revuon. Jen la problemo: memdiritaj maldekstruloj defendas cenzuron kaj silentigon de opinioj pro tio, ke la opinianto apartenas al alia politika partio. Tio, laŭ mi, estas bedaŭrinda.

[...] *aliflanke mi scias al kiu publiko mi laboras. Mi malfermis la paĝojn de Liberecana Ligilo al ĉiu radikal-socialismaj ideoj kaj pensoj. Evidentas ke homoj, kiuj volas propagandi aŭ disvastigi reakciajn ideojn por ne paroli pri*

ekstremdekstrajn ideojn, ne trovas forumo en Liberecana Ligilo.

Laŭ mi, ĉiuj devas pensi per si mem. Mi diris en la paĝo 3-a de la numero 48-a, ke mi ne havas ideologion. Ideologio ne estas utila, kaj neniam estos. Pensoj povas helpi solvi problemojn. Ideologioj kreas problemojn.

La diverseco inter Kajeroj el la Sudo kaj Liberecana Ligilo evidentas, ĉar Kajeroj estas la informilo de Hale, laborista asocio kun membroj kun diversaj ideologioj irante inter liberecanoj tra komunistoj ĝis social-demokrata.

Jes, sed neniuj ideologioj tiaj limigas la revuon **Kajeroj el la Sudo** dum mi estos redaktoro.

Hale estas daŭre pro la Gotenburga konvencio ligita al SAT. Laŭ mia kompreno la idearo de SAT reflektiĝos ankaŭ en la LEA-oj. Do la ligiteco kun SAT iom montras la vojon laŭ kiu HALE konstruiĝis. Mi komprenas ke HALE defendas certan ideologion, sed tiu ne malpermesas ke la redaktanto de la gazeto rajtas, por kompari ideojn, aperigi ideon tute aliflanke ol la propra ideologio. La problemo komprenble estas ke vi povas ricevi akran kritikon de konvinkitaj membroj, bonaj kamaradoj. Mi, pro tio, ne komprenas la reagojn de la prezidanto de HALE al Snajpero.

Mi tute ne objetas al kritikoj, sed Snajpero ne kritikis, li nur atakis akre kaj maldece. Oni ne sendas iun ajn *al fek'*, sed provas, ke oni eraris. Sed tion ne faris Snajpero.

La frazo : Ĉiuj ideologioj estas bonaj, sed homaj estoj perfidas ilin estas *por mi eklezia salivo.*

Vi pravas. Mi diris, ke *Mi male opinias, ke pro tio, ke oni estas homaj, oni kreas bonajn ideologiojn, kiujn trouloj aĉigas, kaj finfine ideologioj korsetigas ties kernajn bonajn ideojn, senvalorigante la tutan ideologion. Pro tio mi aŭdas ĉies ideojn, kaj publikigas tiujn, kiuj mi konsideras, ke utilas aŭ valoras.* Mi ne kredas, ke tio estas eklezia aŭ kontraŭeklezia. Mi opinias, ke tio estas pensiga kaj eble reagiga, se ne defia.

Evidentas ke la idearo de faŝismo neniam rajtas ricevi subtenon. Neniu formo de

ekstremismo estas subtenenda, krom ekstrema propagando por humanismo.

Neniel ni subtenis aŭ subtenas la idearon de faŝismo. Tamen, mi defendas la rajton de ĉiu -eĉ de faŝisto- diri sian opinion. Fari male estas fari faŝisme, laŭ mi.

*Fine, ĝis nun mi kiel redaktanto de **Librecana Ligilo** neniam ricevis tekston, kiun mi ne povis aperi, sed mi scias kiam iam venos la momento, ke mi certe ne forĵetas la tekston, sed unue petas klarigojn al la verkisto kaj se eblas aperiĝos la tekston kiel mi ricevis ĝin, sen fortranĉoj, sen ŝanĝoj. Iu ajn formo de cenzurado estas al mi fremda eĉ kiam mi ricevus leteron kiel la ŝnajperan, sed mi certe prenas kontakton kun li kaj eble ni solvus la problemon sen bruo al la ekstera mondo.*

Tia estas mia sinteno. Sed se mi ne publikigas finfine artikolon, tio neniam estos pro la politika sinteno de la verkinto. Mi ankaŭ estas *malpura*, kaj mi ŝatus esti tiusence lepra, por infekti tiun viruson de toleremo al ĉiu ajn.

Ĉu la franca, sveda aŭ belga realo estas malsamaj al la hispana, mi pridubas. Kontentigi ĉiun [...]

Fakte mi troe simpligis tiun frazon, kara kolego. Sed mi ne kuraĝis diri **publike**, ke la celoj de tiuj magazinoj estas fremdaj al mi, ĉar mi klopodas por ke **Kajeroj el la Sudo** estu kleriga kaj pensiga, kion ne evidentas pri tiuj aliaj magazinoj satidaj. Mi vidas ne multe pli ol *umbilikismo*.

Jesuo



Je la lasta semajno de aŭgusto mi vizitis turisman urbeton en la sudo de Francio, kie okazis kurson de Esperanto por komencantoj, mezgraduloj kaj superaj studentoj, kiuj volis havi la duan diplomon de ILEI

(grado B). La instruistoj estis italo Mario, franca Sr-o Babin, kaj argentino Atiljo Oreĵana. La aliĝantaro estis 30, kio miris min, ĉar estante tiel bone situata -inter Hispanio kaj Italio-, apud iama kongresurbo

La faraono, de Boleslaŭ Prus

Ekde kiam mi esperantistiĝis, mi aŭdas pri tiu *mastra verko de traduko*, sed tamen nenie mi trovis ekzempleron. Tio ŝanĝis je la lasta eldono de la *Kultura kaj Turisma Semajno de Katalunio*¹, kie mi havis la ŝancon meti miajn manojn -kaj okulojn- sur ekzempleron trivoluman de tiu verko. La libroj, iome difektitaj, estis publikigitaj en 1927 de la Esperantista Centra Librejo, de Francio, kaj mi timas, ke ĝi antaŭ longe elĉerpiĝis². Laŭ mia kono, ĝi ne estas reeldonita, escepte de sona versio fare de Pola Radio³. Tio estas bedaŭrinda afero, kulpebla sole al fanatikismo de kelkaj esperantistoj, kiuj taksas la tradukinton, Kabe, kiel *perfidulon* al Esperanto. Mi deziras, ke ĉiu *perfidulo* (kaj ankaŭ almenaŭ kelkaj *neperfiduloj*) faru tiom altkvalitan servon al Esperanto, kiel Kazimiro Bein' faris per tiu majstra traduko. Mi ne konas la originalan pole verkitan verkon, sed mi konas pri Esperanto, kaj libro kiu *legiĝas sole*, tio estas, kiu ne postulas tro da laboro al leganto por bone kompreni sian tekston, ja estas majstra libro, kaj do ankaŭ ĉi-kaze, traduko. Sekve, oni apartigu la konceptojn *perfidon* al Esperanto kaj *literaturan verkon*, bonvolu. Oni certe gajnos per tio.

Mi voris la 634 paĝojn de la verko, kaj mi miris pri la fakto, ke kvankam

¹En Blanes.

²Pro tio mi konsideras republikigi ĝin en Kajeroj el la Sudo baldai.

³Post verki tion, mi trovis elektronikan novan eldonon ĉe <http://esperanto.nu/Librooj/>, kiu prizorgas Franko Lwin.

oni tuj vidas la nomon de la tradukinto sur la koverto de la libro, oni nur metas Boleslaŭ Prus kiel veran aŭtoron B. Prus.

Sed kiu estis tiu homo, Prus? Boleslaŭ Prus naskiĝis en pola urbo Hrubieszovo, kelkajn kilometrojn okcidenten de Rusio kaj ĉirkaŭ 300 kilometrojn suden de Bjalistoko. Lia vera nomo estis **Aleksandro Ĝuovaski**, kaj li estis ĵurnalista kaj grava literaturisto en la *pozitivist*a periodo de pola literaturo post la revolucio de 1863. Inter liaj verketoj, oni trovas *Legendon pri Antikva Egipto*, *La veŝton*, kaj *La barilorganeton*. Liaj plej ŝatataj noveloj estas *La pupo*, kiu bildigas komplikan burĝan vivon en Varsovio antaŭ ekzakte unu jarcento, kaj *La Faraono*, per kiu li prezentas funkciadon de ŝtato kaj psikologion de homoj de povo, verkitan en 1897.



Boleslaŭ Prus

Je la komenco de la rakonto, ni trovas junan princon Ramsezon kaj elegantan amikon Tutmozison en militaj manovroj por pruvi ĉu la unua estos granda faraono iam. Ni trovas ankaŭ la Ĉefpastron Herhoron, kiu havas ankaŭ gravan parton en la novelo. *Kronprinco* Ramsezo havas multe da ideojn favorajn al kamparanoj kaj al popolo. Pro tio malgajigas kaj ĝenas lin, ke kamparano sinmortigas ĉar soldatoj per siaj manovroj detruas lian laboron, kiu sensklavigus lin kaj lian familion. La rilatojn de la princo kaj kamparanoj kaj eksterlandanoj la aŭtoro priskribas tre detale: li amoras kun hebreino Sara kaj kun fenica Kama, Dagon estas lia fenica bankisto kaj eĉ Hiram, fenica princo, amikiĝas kun la princo heredonto.

Por kompreni la etoson priskribita de ĉi tiu libro, oni devas memori, ke en Egiptio tiutempa vivo estis same kiel piramidoj: ĉio venas el supera vertico: estas nur unu faraono, samtempe reĝo kaj dio, kaj sub li estas areto da supernobeluloj kaj pastroj, sub kies tavolo estas cetera nobelularo kaj malalta pastraro. Finfine, estas popolanoj, kaj sub ili sklavoj, kiuj estis pli multnombraj, tiom, kiom eroj da sablo.

Ramsezo 12-a, la patro de nia heroo, estis ankaŭ supera pastro, kaj pro tio oni vekigis lin noktomeze, por sciigi al li pri tio, kion la astroj diris. Li tiam interpretis tion, ion oni devas fari. Sed nia *kronprinco* ne volis esti



religia, sed arma homo. Laŭ li, Egipto ne plu estas grava lando, kaj sekve ĝi bezonas bonajn soldatojn, ne preĝojn. Tial li kreas batalojn da eksterlandaj soldatoj, ĉefe grekoj, ĉar ili luktas pli science ol la ceteraj nacioj. Sekvas al tio, ke kiam la kronprinco iĝas faraono baldaŭ post la morto de sia patro, komencas milito inter la faraono kaj la pastraro.

La libro estas dividita en tri volumoj, kiujn ni povus konsideri kiel tri aktojn de tiutempa teatraĵo: en la unua ni lernas pri la etoso de antikva Egipto, en la dua volumo formiĝas konflikto inter la estonta faraono kaj estanta supera pastraro, kaj en la tria okazas la solvo al tiu konflikto. Mi ne tute ŝatas tiun konkludon, kvankam ĝi estas la plej logika. ♥

Venas de paĝo 11-a

Montpeljero, la vetero tiom agrabla kaj la etoso tiom altira, oni esperus, ke multaj esperantistoj de Katalunio kaj Okcitanio, kaj ankaŭ la norda parto de Italio, elektus tiun esperantistan eventon por pasigi ĉarme la

finon de la somero; eĉ pli pro tio, ke la loĝejo havas apudan strandon, atingebla per privata, subŝosea vojeto. Tamen, eksterfrancianoj estis multe malpli ol francoj en tiu staĝo (semajna kurso kies kursanoj loĝas kune).

La staĝon organizas de antaŭ kelkaj jaroj S-ino Vierne, kiu estis vicprezidanto de la Loka Komitato dum la Kongreso Universala de Montpeljero antaŭ tri jaroj.

Plej grava en tiu staĝo por mi estis la klasprocedo: anstataŭ normigon pri



la lingvo, kion ni ricevis estis pensigon pri ĝi. Sesdeko procento de la supera klaso estis eksterlandanoj, el Hispanio, Maroko kaj Brazilo. Fine, ni faris ekzamenon trihoran, kaj poste du trionoj ricevis diplomon.

Ja estis agrabla etoso, kaj ni laboris por Esperanto. Kion pli oni povas peti? Mi konsilas al vi ĉiuj aliĝi al la venonta staĝo en aŭgusto 2001. Informo: Esperanto, 5, rue du Docteur Roux, FR - 34090 MONTPELLIER, Francio, aŭ pertelefono al S-ino Vierne, (00 33) 46 67 54 15 43.



Instruisto Oreĵana atente konsideras dubon prezentatan de lernantino.

Okaze de la 25 jaroj sen Franko

Inter tiuj eventoj de Diktatoreco de Fransisko Franko kiuj plej ŝokas nin, estas en eminenta loko la rilato kun la Katolika Eklezio kaj ĝia evoluo.

Respublikaj gvidantoj, kiuj miris Francion, provis starigi en Hispanio sistemon inspiritan en la 3-a Franca Respubliko: krei ŝtaton laikan kaj demokratian. Ili fieris, ke la Respubliko iĝis per voĉdonado, kaj ne per sangversado. Tiuj gvidantoj estis intelektuloj, sed sperto politika mankis al ili, kaj fakte el la unuaj 300 deputitoj nur 20 havis politikan sperton. Pro tiu manko da sperto politika, ili atakis la Eklezion. Se antaŭe ili legus kaj lernus *La princon*, de Nikolo Makjavelo (kies prototipo estis Fernando de Aragono, la *Katolika Reĝo*), eble ili dividus la eklezion per atako al ĝia plej malforta punkto: ekzisto de malalta pastraro malriĉa, preskaŭ respublika, male al la atklasa pastraro, kiu estas promonarĥa.



Hitlero kaj Franko en Hendaya

Sufiĉus al ili plialtigi la salajron de malaltaj pastroj, dignigi ilin ekonomie, por ke tiu dividido realiĝus. Sed ili faris tute male: ili



Fransisko Franko

nuligis sian ekonomian subtenon al malalta pastraro, kaj samtempe ili atakis la altan pastran klason. Tion ili faris nome de sia laikismo kaj la rezulto estis, ke kaj alta kaj malalta pastraj klasoj unuiĝis kontraŭ la Respubliko. La atako estis triobla: oni malpermesis al ili instrui, oni ne plu pagis saljron al ili, kaj la Kompanio de Jesuo estis forpelita el Hispanio. Aldone, oni bruligis monaĥejojn kaj preĝejojn kaj oni mortigis pastrojn sendiskriminacie, ĉefe dum la milito.

Kiam la milita klaso ribelis, sufiĉis ke ili apogis la altan pastran klason por ke larĝaj sociaj tavoloj katolikaj apogis la ribelon.

La nova ŝtato faŝistema protektis la eklezion per la Leĝo de Protekto Religia, kiu malebligis disvastigi aliajn kredojn en Hispanio dum 25 jaroj; privilegioj en instruado per fermo de ŝtataj mezler-

nejoj, fiskalaj avantaĝoj, kontrolo de publika moralo, kaj eĉ eksterteritoriaj privilegioj. Unuiĝo de Eklezio kaj Ŝtato estis fakto.

La Eklezio apogis la ribelon per deklaracio pri ĝi kiel *Krucmilito*, kaj eltenado de pozicio duba inter rankoro kaj pardono al venkito.

Tamen, ekzistas ekstera fakto, kiu malhelpis ilin unuiĝi:

la dialogo kristana-marksista. Tiu dialogo komencis en postmilita Eŭropo kaj ĝi komencis erodi la diktatorecon; kristanoj kaj marksistoj aĉentis tion, kio unuiĝis ilin, kaj ne tion, kio apartigis ilin. Rezulto estis, ke en Hispanio aperis *ruĝaj* pastroj, kiuj kompromitis sin kun sia socia situacio. Sekvo estis, ke oni kreis sindikaton *Laboristajn Komisiojn*, kiu nun estas la ĉefa sindikato en Hispanio, kaj en ĝi partoprenis kristanoj kaj markistoj. Dua rezulto estis, ke *ruĝaj* pastroj protektis tiun sindikaton, ĉar la ejoj por ĝiaj asembleoj estis preĝejoj, profitante tion, ke Frankismo antaŭe subskribis *Konkordaton*¹ kun la *Sankta Sidejo*, per kiu la polico ne povas eniri preĝejon, sen antaŭa permeso de la episkopo koncerna. Ĉiam, kiam la polico petis permeson al episkopo, li refuzis, kaj sekve eklezio leĝigis neleĝan sindikaton, kio estis paradokso.

Alia sekvo, kiun Frankismo ne deziris, estis la elekto de episkopoj. Laŭ la konkordato, Franko prezentis tri kandidatojn, kutime tre reakciaj, al la Sankta Sidejo, kiu devis elekti unu el ili; sed vere la Papo elektis neniun, kaj

¹Kontrakto inter eklezio kaj ŝtato.



Kardinalo Tarankon', progresisma pastro.

tamen la postenojn provizore okupis ano de progresisma sekcio de la eklezio.

Alia sekvo al dialogo inter kristanoj kaj marksistoj estis konvertiĝo de multe da personoj. Dum Frankismo estis ofta, ke kelkaj personoj kompromititaj kun ĝi transformiĝis sian sintenon al vivo, ekhavante kompromitojn, kiujn ili ankoraŭ ne forgesis. Male al hodiaŭa Hispanio, kie multaj junuloj, kiuj ankoraŭ ne havas sendependon ekonomian, kompromitas sin per partoprenado en Ne Registaraj Organizoj (hispane: ONGs), tiuj personoj dum Frankismo akiris sociajn kompromitojn per renonco al socia kaj ekonomia statuso, aŭ danĝerigante ĝin. Ekzemplo estas, ke la konfesisto de Franko, falangisma pastro, havis ĉion: oficialan aŭtomobilon, bonajn manĝojn, politikajn influojn, bonan salajron, kaj tiel plu. Tamen, pro tiuj dialogoj kun komunistoj tagon li forlasis Frankon kaj translokiĝis al marĝena kvartalo de Madrido, kie ne estis lumo elektra, akvo kuranta, sed ja estis multe da immigrado kaj malespero.

Plej interesa pri tiu dialogo estis teksto de Konferenco Episkopa (assembleo de epikopoj kaj ties surogatoj) per kiu oni studis tekston per kiu la Eklezio petis pardonon al hispana popolo pro tio, ke ili subtenis Frankismon. La tekston aprobis plimulto da tiu Konferenco, sed ne ties du trionoj, kaj pro tio ĝi ne oficialiĝis. Tamen, ili aprobis ĝin en 1971, kvar jarojn antaŭ la morto de la diktatoro Franko. Tio signifas, ke tio, kion senespertaj respublikanaj gvidantoj ne atingis, dialogo inter kristanoj kaj marksistoj, sukcesis per ĉeso de apogo eklezia al Frankismo.

Tamen, ni ne forgesu ke, fronte al progresisma frakcio, estis ankaŭ la alia reakcia frakcio, kiu perdis ĉiun batalon. Unu el tiuj bataloj temis pri la filmo *Ĝildo* (Gilda). En tiu filmo, Glenn Ford vangfrapis la ĉefrolulinon, kaj ankaŭ estis tre erotika danco de Rita Hejűez (Hayworth). Reakcia episkopo komencis krucmiliton kontraŭ tiu filmo, kaj la rezulto estis, ke li plenigis la kinejon: hispanoj tiamaj opiniis, ke se la eklezio malpermesis ĝin, la filmo estas bona. Beatinoj ĝenuis kaj krucumis siajn brakojn por ke hispanoj, kiuj vicis por aĉeti bileton por la kinejo, rezignu. La rezulto estis granda ekonomia sukceso por la filmo. La episkopo mortis unu semajnon post la malsukceso de sia krucmilito.

Alia malvenko de episkopoj reakciaj estis bikino. Je la mezaj sesdekjaroj la registaro permesis uzi bikinon. Reakciaj

episkopoj lanĉis alian krucmiliton, kiun ili malvenkis. Tio okazis dum la regado de la sama registaro, kiu dudek jarojn antaŭe malpermesis, ke hispanoj kaj hispaninoj naĝis kune en la samaj strandoj, ĉar ĝi male estis ofendo al moralo katolika.

Ni vidas, ke malvenkis la frakcio reakcia kaj venkis tiu progresisma de la eklezio, ĉar estis dialogo inter kristanoj kaj marksistoj. Se tiu dialogo okazigintus de respublikanaj politikistoj en oportuna momento, ili dividintus la eklezion, kaj estas dubinde, ke estus intercivitana milito. Sekvo al eraro de politikistoj respublikanaj estis kvardek jaroj da diktatoreco. Sekvo al dialogo inter kristanoj kaj marksistoj estis subfoŝado de plej forta piliero de la frankisma reĝimo.

Horacio de la Peña



Prezidanto de la Respubliko, Manuel Azaña, kaj Franko

Kunveno de HALE

Je la 12-a de novembro de 2000 kunvenis la ĝenerala asembleo de HALE por la lasta fojo dum la lasta jarcento, je la sesa kaj duono vespere, estante la tagordo jene:

- 1 La kongreso de SAT en Alikanto.
- 2 Kajeroj el la Sudo.
- 3 Financoj.

Rilate al la unua punkto, kamarado Marteno Bustin' proponas Kamaradon Jozefon Marian Bernabeŭn kiel Prezidanton de la Kongresa Loka Komitato, sed li rifuzas, ĉar li estas katolika. Finfine oni decidas, unuanime, ke la prezidanto de tiu komitato estu Marteno Bustin' Benito, kaj sekretario de la Kongreso estu Lija Tatojan. Ĉeestantaj lorkanoj pretas kunlabori por sukceso de la kongreso. Aliaj komitatanoj estas

Juan Antonio Cabezas
Martínez, José María
Bernabeŭ Franco kaj
Jesuso de las Heras,
krom la anoj de la
Grupo de Esperanto
Piro Estas Frukto.
Oni kalkulas, krome,
kun helpo de Pedro
Ruiz García kaj José

Pina Tuells, kiuj tamen ne estos komitatanoj.

Oni konsentas pri proksima kunveno rilate al Kongreso en Callosa del Segura, ĉar ĝi kuŝas duonvoje inter Alikanto kaj Mursjo. Tiu decido ne estas unuanima, ĉar estas unu voĉo kontraŭa.

2 Kajeroj el la Sudo. Marteno Bustin' petas, ke oni publikigu fundajn artikolojn rilate al SAT en preskaŭ ĉiu numero, ĉar celoj de ĝi estas instruado de Esperanto kaj varbado al SAT. La redaktoro invitas ĉiun ĉeestanton verki ilin kaj sendi al li por publikigo. Intertempe, li povas publikigi nur tion, kion li havas. Oni petas ankaŭ, ke oni publikigu la unuan paĝon de la Statuto de SAT, kaj ke ĝi estu ofte publikigita en la magazino.

Grava afero, denunciita de Marteno Bustin' ankaŭ, estas, ke oni publikigas artikolojn en nia organo, kiujn Snajpero akre kritikas. Sekve al tio, estis reago de José Pina, la redaktoro kaj de la Prezidanto de HALE. Por bone klarigi tiun aferon, oni denove legas laŭte la sekvantajn artikolojn:

a *Provizordungaj perentreprenoj*, de falangisto Fernando Letamendía.

b *Faŝismo, hipokriteco kaj aliaj fiaĵoj*, de Snajpero (en **Laŭte!**)

c *Limoj al liberesprimo*, de José Pina.

Kamarado Bustin' diris, ke oni ne metu tiujn artikolojn en **Kajeroj el la Sudo**, ĉar *Falango estas io hontida. Dum la unuaj tagoj de la Hispana Milito ili mortigis milojn da homoj, da maldekstruloj. Do, mi ne komprenas vian laŭdadon de falangismo. Pri la progresismo de Falangismo, mi diras, same kiel Snajpero, Fi! Tio neniel helpas HALEn.*

ĉ Redaktora artikolo en la numero 48-a. Marteno referencas al artikolo de Vinlas Markov en SAT-Amikaro.

d *Pri pasia reago al alies opinio*, artikolo publikigita en numero novembro, 48-a. Fakte tio estas eltiro de la redaktora politiko.

Marteno finas dirante, ke tiuj artikoloj ne utilas al HALE.

3 Financoj. José María Bernabeŭ, nia kasisto, diras ke estas en nia konto nur 23 960 pesetoj. Estas multaj anoj de HALE, kiuj pagas nur je la fino de la jaro, eble pro malzorgo pri la afero aŭ forgeso, sed oni uzas tiun monon ekde la unua de januaro. La asocio ne bankrotis ankoraŭ ĉar kelkaj sindonaj anoj pagas kelkajn jarojn antaŭe, sed tio ne estas justa. Ni ĉiuj subtenu nian asocion.

La kunveno finis je la oka kaj duono vespere.



Pri la 60-a Hispana Esperanto-Kongreso en San Javier (Murcia)

Kiam: de la 22-a ĝis la 30-a de junio 2001.

Kie: Kongresejo: Centro Cívico de San Javier. Parque Almansa.

Kiom: Kongreskotizoj en pesetoj: ĝis la 30-a de Aprilo: 5.000 Poste: 5.500.

Kie pagi: Kotizu pere de BBVA, konto-numero: 0104-0028-86-0300159774; al la 60a Hispana Esperanto-Kongreso; ES-30730 San Javier (Murcia). Kunsendu la pagpruvilon kaj la aliĝilon al la suba adreso. Por bankĉekoj kaj poŝtmandatoj aldonu 10%. La kotizo estas ne repagebla.

Kiu: Kongresa Sekretario: Vicente Sánchez Lumbreras; Saturno 15; ES-30730 San Javier (Murcia); Tel: 968192598; 968191243; 968183338; 968190588.
Retadreso: vsal0001@almez.pntic.mec.es

Kie dormi: Loĝado: San Javier kaj Santiago de la Ribera (Manga del Mar Menor).

La organizantoj de la kongreso ne faros rezervojn por loĝado. Tamen oni sendos al aliĝintoj, kaj eventualaj pentintoj, liston de hoteloj kun telefonnumero, proksimuma prezo, kaj ĉiuj proponitaj servoj. La hoteloj disponos la liston de kongresanoj, por aplikado de favora tarifo. Nun, por orientado, jen

kelkaj nomoj de loĝejoj kun proksimuma prezo (P:):

A. Hoteloj:

1 Albohera (***) Marin 29, S. Ribera. Tel. 968335914. (P: 7.500 — 10.000).

2 Lido (**) Conde Campillo 1, S. Ribera. Tel. 968570 00. (P: 5.000 — 7.500).

3 Hotel Madrid (*) Zarandona 18, S. Ribera. Tel. 968570504. (P: sub 5.000).

3 Pensión Manida (**) Muñoz 11, S. Ribera. Tel. 968570011. (P: sub 5.000).

4 Pensión Nenico (**) Principe 8, S. Javier. Tel. 968572901. (P: sub 5.000).

B. Apartamentoj AT Pagán (**)
Maestre 4, S. Ribera. Tel. 968570032. (P: 5.000 — 7.500).

C. Kampadejoj Camping La Encina, Ctra. La Ribera—Los Alcázares, tel. 968570133. (P: 2.000 — 4.000) Post la 30 de junio, la organizantoj NE garantias loĝadon, tiuepoke ĉar la regiono plenas de turistoj. Faru vian rezervon kiel eble plej frue!



Datreveno «negrava»

Hodiaŭ (la 30-an de novembro de 2000) estas la centa datreveno de la morto de Oskar Ŭajldo (Oscar Wilde), kiun oni konas en Hispanio eble nur pro tio, ke li estis samseks-emfikata («maricón»)..., sed li ankaŭ estis verkisto kaj li eĉ sukcesis diri plensencajn aferojn, kiel tiujn, kiujn mi tradukis por ĝenerala scio. Tio estas la plej inda omaĝo al li, kiun mi kapablas:



- @ Donu al mi superfluaĵon, ĉar necesajon ĉiu povas havi.
- @ Ofte mi pensas, ke Dio, kreante homon, troestimis sian kapablon.
- @ Mi amas simplajn plezurojn: ili estas la lasta rifuĝejo por komplikaj homoj.
- @ Kiel oni povas fidi virinon, kiu konfesas sian aĝon veran? Se ŝi kapablas diri tion, ŝi povas diri ĉion.
- @ Ĉiu ajn povas fari ĉion. La merito estas kredi ĉiujn, ke oni faris ion.
- @ Ju pli konservativaj ideoj, des plu revoluciaj paroloj.
- @ Finfine, kio estas modo? El vidpunkto arta, malbelformo tiel neeltenebla, ke ni devigas nin ŝanĝi ĝin ĉiujn ses monatojn.
- @ Senkulpigite min pro tio, ke mi ne rekonis vin. Mi tiom multe ŝanĝis!

@ La arto pri muziko estas tiu plej proksima al larmoj kaj memoroj.

@ Arto estas la plej intensa formo de individuismo, kiun la mondo konis.

@ Cinikismo estas vidi aferojn tiel, kiel ili vere estas, kaj ne tiel, kiel oni volas, ke ili estu.

@ Mono ne donas feliĉon, sed ĝi provokas sensacion tiom similan, ke oni bezonas esti fakisto tre kompetenta por trovi diferencon.

- @ La plej bona maniero liberiĝi de tento estas fali en ĝin.
- @ La sola diferenco inter kaprico kaj pasio estas, ke la unua estas pli longdaŭra.
- @ Viroj volas ĉiam esti la unua amo de virino. Ni virinoj preferas esti la lasta amo de viro.
- @ Mortigi estas stulteco. Oni neniam devas fari ion, pri kio oni ne povas paroli ĉe manĝotablo.
- @ Mi ŝatas rigardi geniajn virojn kaj belajn virinojn.
- @ Jen la du solaj reguloj por verki: havi ion diri, kaj diri ĝin.
- @ Estas terure, ke oni parolas pri mi. Sed estas io pli malbona: ke neniu parolu pri mi.
- @ Ni nur povas opinii senpacie pri aferoj, kiuj ne interesigas nin. Pro tio senpasiaj opinioj ne valoras.

Kion signifas Esperanto por laboristoj

Neblas komenci, tio estas, sintezi, per mallongaj frazoj la tutan valoron kaj utilecon de la internacia lingvo Esperanto pri tutaj siaj variaj flankoj. Tiom multaj kaj multe da rilatoj esperanto okazigas inter homoj el diversaj kaj foraj landoj, ke ni neniam finus listi kaj prikomentoj ĉiujn el ili detale.

Mi nur intencas prezenti Esperanton el mia vidpunkto klasa.

La graveco de ĉiu produkto de homa genro kuŝas sur tiu utileco, kiun ĝi havas por la socio, ĉefe se tiu produkto ne estas alproprigita kiel patrobieno absurda kaj ekskluziva de privilegiita parto aŭ klaso de tiu socio. Estas same, ĉu tiu produkto satigas bezonojn materiajn aŭ moralajn, sengravante ĉu tiun utilecon reprezentas artaĵo, muzikaĵo, teatraĵo, vestaĵo aŭ kilo da terpomoj... El tiu ĉi principo baza kaj ornama ni, laboristoj, devas fokusigi kaj pensi ĉiujn niajn problemojn. El praktika kaj utila vidpunkto ni devas konsideri studi Esperanton. Dum Esperanton uzis nur kvar pseŭdo-intelektuloj por celoj utopiaj, ĝi ne plenumis sian funkcion liberigan kaj revolucion, kiun reprezentas ĝi, same kiel en la pasinto estis la vapormaŝino, printejo, elektriĉo, kaj tiel plu. Uzi Esperanton por sengravaĵo aŭ kaprica tempopaso estas malpliigi al sia plej malgranda esprimo sian grandegan utilon. Ĝi estas, unuvorte, kasti ĝian grandan utilecon kaj efikon. Esperanto ankoraŭ ne komencis esti viva, reala, gravega, sed jam plenumas facile kaj larĝe bezonon sencohavan.

Sed, bezono de kio? Simple, de la laborista klaso, kaj pli precize de la internacia proletaro. Ĉiaj kapitalismaj klasoj ne nur ne uzis aŭ promociis Esperanton, sed ili ĉiam rigardis ĝin kun

malestimo aŭ malsimpatio. Se ili iam okupis sin pri Esperanto, la celo estis malhelpi ĝian efikon, pro tio, ke ĝi reprezentas valoregan elementon por emancipiĝo de ekspluatata klaso. Tio estas nature: kian intereson povas senti por Esperanto tiuj, kiuj havas Lernejon, Universitaton kaj Akademion? Kian bezonon povas satigi Esperanto al tiuj, kiuj monopolizas artojn, sciencojn, kaj aliajn gravajn konkerojn de homa inteligento?

Aliflanke, kiujn avantaĝojn ofertas ĝi al ni, ekspluatatoj, malestimate, al ni, kies tuta intelekta kaj kultura valoro estas maniero labori, produkti kaj esperi, ĉiam esperi; al ni, kiuj ne sukcesis havi alian universitaton aŭ laboratorion ol fabrikon, uzinon, metiejon? Por ni, do, Esperanto estas grava konkeraĵo, kaj indas, ke ni sciu kiel profiti ĝin.

Ju pli problemoj ne estas naciaj, sed internaciaj, des pli ili ekhavas pli akutan rigardon, pli eksplicita estas la bezono lerni tiun ĉi helpan lingvon. Tiu proceso historia, kiun hodiaŭ travivas homaro, estas metita inter burĝaro kaj proletaro. Tiu ĉi devas sin prepari por venki la batalon en kiun ĝin enigis la terura disigo de la kapitalisma reĝimo. Pro tia lukto je vivo aŭ morto proletaro devas unuiĝi kaj kunrilati al proletaro el aliaj landoj por rezisti kaj venki tiun batalon ĉe ĉiu fronto. El tio ĉi devenas la granda pliiĝo, kiun havas hodiaŭ Esperanto en ĉiu laborista etoso. El tio komencas aktivado, entuziasmo preskaŭ febra, kiun oni vidas hodiaŭ en laboristaj esperantaj vicoj. Kaj ni ne povas, ne devas esti, escepto.

Serio da leĝoj fatalaj, nepardonantaj, devigas nin alfronti gravajn problemojn (tiajn, kiajn hodiaŭ oni jam starigis en multe da landoj) kaj ekbatali en la pli-

malpli proksima estonto. Kaj ju pli preparitaj ni estos por solvi tiujn problemojn, ju pli inteligentaj ni estos en la batalo, des malpli da doloroj kaj oferoj ĝi kostos al ni.

Esperanto, metante ni en la konon kaj kontakton kun la ekstera mondo, malpezigas nin de vico de konceptoj kaj antaŭjuĝoj kastrantaj, kiuj sklavigas nin kaj submetigas nin en malestimiĝan ignoron. Esperanto plifaciligas koni tiujn fenomenojn, kiuj regas la socion kies dentorado ni estas. Esperanto permesas al ni supreniri iom post iom la piramidon de scio, kaj el ties alteco povi larĝigi nian horizontojn, novajn perspektivojn, kiuj al ni portas promesoj pri socio pli homisma, pli justa kaj egaliga ol tiu, en kiu ni vivas, farante nin pli fortaj kaj optimismaj, kaj povi rigardi vivon pli fronte. Lerni

Esperanton signifas kreski kulture kaj ideologie, se ni volas diri tion unuvorte: konsciiĝi.

Mi ne sciis fini tiujn ĉi liniojn sen antaŭe konstati testimonion de mia omaĝo al grupo esperantista *Esperanta Unio* de ĉi tiu urbo. Ĝi estas bonega ezemplo, ĝi estas gesto kuraĝiga, tiu de tiu grupo da gejunuloj kaj infanoj, kiuj, pro sopir' al scio kaj granda entuziasmo, iras al kurso de Esperanto. Ricevu ili ĉiuj el ĉi tiu kolono, mian plej koran kaj sinceran gratulon, kaj ankaŭ via bela ekzemplo servu kiel stimulon al la cetera junularo de ĉi urbo, kie nia hodiaŭa klopodo havu iam belan vekiĝon.

*Sabadell, la 28-an de marto de
1932,*

Profesoro R. Artea




La mardon 5-an de decembro de 2000, en klasĉambro de Aŭtonoma Universitato de Barcelono, kontentiĝe finis Kurso de Esperanto, kiu daŭris tri monatojn, kun partopreno de 26 gelernantoj kaj kiun organizis la Kultura Asocio Esperantista -KAE- de Sabadell.

Gratulon al sabadeljanoj, kaj ĉiualilokanoj imitu ilin.

Enkonduko en muzikon

Kanto kaj akompano.

NI jam konas du akordojn: *do* kaj *sol*. Tiu lasta estas la akordo de *dominanta*, ĉar tiu noto, *sol* regas aŭ *dominas* (el *dominus*, mastro, en la latina) la tonon de *do*. Sed estas alia akordo utila, tiu de *subdominanta*, tiel nomita, ĉar oni faras per la noto antaŭa al *dominanta*, kiu estas *fa*. Do, jen la akordo: *fa-la-do*. En la apuda diagramo oni povas vidi manieron



konstrui ĝin per gitaro: la dika nigra baro reprezentas la indeksan fingron, kiu devas premi la tutan kordaron flankeflanken, dum la dua fingro devas premi la trian kordon je la dua

trasto, kaj la tria kaj kvara fingro devas premi la kvaran kaj la kvinan je la tria trasto. Nun ni nur bezonas glitigi la dika fingron de nia dekstra mano laŭ la kordaro por ke *akordo de fa* sonu.

Per ĉi tri akordoj ni povas akompani preskaŭ ĉiun kanton. Ekzemple, tiun mastran verkon de Franz Grüber, *Nokto Silenta*, kiun vi nun aŭdas, se vi legas ĉi tion en Interreto. Je la piedo de ĉi paĝo vi trovas la akompanion al tiu ĉi melodio, kune kun la diagramoj de la koncernaj akordoj aŭ *pozicioj*. Tiujn notojn kies plikoj signalas suben oni devas frapi per la dika fingro dekstra, kaj la aliajn per la indeksa, meza kaj ringa fingroj.

Sed trovi tiujn notojn en la gitaro povas esti komplika, sed se ni scias tiun, kiu noto estas ĉiu kordo *malferma* (sen premi ĝin per maldekstra fingro), kaj tion, ke ĉiu trasto plialtiĝas ĝin po duono da tono, ni trovos ĉiun noton.

Venontfoje mi klarigos pri malnova metodo por faciligi tion.

Franz Grüber

do M
sol
fa



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, Tfn° (00 34) 658
E30080 MURCIA, 166 323
HISPANIO

Retskribu al
jesuo@ono.com

STATUTO de SAT

1. Sub la nomo **Sennacieca Asocio Tutmonda** (SAT) estas fondita Asocio, kiu celas:

- a) Utiligi praktike la internacian lingvon ESPERANTO por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda;
- b) Kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortkan senton de homeca solidaro;
- c) Lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj;
- ĉ) Servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamligvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT;
- d) Peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de nia Asocio.

SAT, ne estante partipolitika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per kompraro de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe membroj la **dogmiĝon** de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

Unuvorte, SAT celas per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari ĝuste kompreni kaj priuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso al forkonduko de la homaro al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

(Unua paĝo de la STATUTO DE SAT)